

N. N. 88,

## Sur monteto tie staras

*tradukita de Antoni Grabowski*

*La kozako*

Sur monteto tie staras  
Verda la acero;  
Mortas juna la kozako  
Sur la fremda tero:

“Mortas mi, en fremda lando  
Venas mia fino,  
Do alvoku la patrinon,  
Mia amatino!”

Kaj alvenis la patrino,  
Venis patrineto,  
Turnis palan la vizaĝon  
Kontraŭ la fileto:

“Ho fileto, mia kara,  
Devis vi perei,  
Ĉar ne volis vi konsilojn  
De l’ patrin’ obei.”

“Mi vin petas, patrineto,  
Bele enterigu:  
Oni batu sonorilojn,  
Kaj orgen-ludigu;

Sed ne gvidu min al tombo  
Pastroj, nek diakoj,  
Nur en teron ukrainaj  
Metu min kozakoj.”

*Traduko de la Pola poemo “Tam na górze jawor stoi,” de N. N. 88 en Esperanton de ANTONI GRABOWSKI (\*1857-06-11 – †1921-07-04).*

*Arg-1011-2048 (2014-05-18 13:13:18)*

*Tiun ĉi kanto-tradukon mi, Manfred Retzlaff, trovis en la libro “Internacia Kantaro”, eldonita en 1922 de la eldonejo Ferdinand Hirt und Sohn en Lepsiko (Leipzig), Germanio. La kantojn kolektis kaj eldonis Paul Bennemann, sur paĝo 46. La teksto troviĝas ankaŭ en [http://donh.best.vuh.net/Esperanto/iteraturo/Poezio/parnaso/la\\_kozako.html](http://donh.best.vuh.net/Esperanto/iteraturo/Poezio/parnaso/la_kozako.html).*